Karaj legantoj!

Per tiu ĉi numero ni sukcesis reakuratigi la aperadon de nia revuo *Juna amiko*.

Ĝis la jarfino aperos ankoraŭ du numeroj, sed ekde la venonta jaro ni planas eldoni ĝin kvar-foje jare.

Kion alportas al vi la nuna numero? Krom la jam kutimaj rubrikoj kiel *Konversaciaj temoj, LUME, Amuza matematiko, Ekstere, Legu kaj Ĝuu, Kantu kun Juna Amiko, Interkultura mondo, LUDE, LASTE* kaj *Nia kultura heredaĵo*, vi en tiu ĉi numero trovos interesajn rakontojn kaj legendojn, recenzon pri porinfana libro, bildrakontojn (komiksojn) kaj ankaŭ... – receptojn.

Receptoj... Ankaŭ via redaktoro bezonas receptojn por povi "baki por vi bongustajn kukojn". Kaj ankaŭ kvalitajn materialojn kaj ingrediencojn, por povi komplili kaj redakti interesajn, riĉenhavajn kaj belaspektajn numerojn de nia kara *Juna Amiko*. Mi do alvokas vin al kunlaboro: Se vi ricevos ideon pri artikolo, kiu taŭgas por nia revuo, bonvolu verki ĝin, kaj sendi, se eble kun bela bildo aŭ foto, al via redaktoro. Krom aktiva kunlaboro mi petas vin ankaŭ pri eta **enketo**: bonvolu skribi al mi kio plaĉas, kio ne plaĉas, respektive kio mankas al vi en la lastaj numeroj de *Juna Amiko*. "Kiom da homoj, tiom da gustoj", diras proverbo. Kredu, ke mi volas koni ankaŭ vian "guston", por povi klopodi, ke nia revuo estu ankaŭ por vi bongusta.

Stano Marček

Majo 2014

Vi, abonantoj, ĝojas havi enmane la unuan numeron de la serio 2014 de *Juna Amiko*. Mi aŭdis pri novaj abonantoj. Mi salutas ilin elkore, kaj bonvenigas ilin. Kiel ni ĉiuj ili ŝatos nian revuon kaj lernos el ĝi.

Majas nun. Post du monatoj okazos niaj gravaj eventoj: Universala Kongreso, ILEI Konferenco, Junulara Kongreso. Eble ni havos la okazon renkontiĝi kaj paroli pri la agado de ILEI ĝenerale kaj pri la subteno al lernado. Piliero por la lernado estas precize *Juna Amiko*. Ludoj, bildstrio, legaĵoj, raportoj, multo alvenas al vi, kaj ebligos al vi senpene bani en nia lingvo kaj progresi en ĝi.

UK kaj ILEI-Konferenco okazos en la suda hemisfero de la mondo. Do la norduloj devos forlasi sian someron kaj plonĝi en vintran klimaton de du landoj, kiuj situas pli sude ol Sud-Afriko!! Brrrrrrrrrrrrrrrrrrrrrrrrrr..... Kunportu varmajn vestaĵojn!!!

Se vi ne kongresumos, se vi ripozos en iu plaĉa loko, nepre kunportu *Junan Amikon* kaj aliajn legindaĵojn! Tiel vi okupos vian ripozon per akiro de novaj scioj kaj plezurigaj momentoj.

Mireille Grosjean
Prezidantino de ILEI

Ek al la Universala Kongreso

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghi

I. Aliĝo al la Universala Kongreso

La amikinoj Herminjo (H) kaj Alinjo (A) babilas ĉe Herminjo. Karlo (K) estas la koramiko de Alinjo.

H: – Mi havas grandan ideon, Alinjo! Jen, rigardu: aliĝilo al UK! Necesas nur plenigi tiun formularon kaj sendi ĝin.

A: – Kio estas tio? Kio estas tiu uko?

H: – Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri la Universala Kongreso? Ĝi estas bona okazo por renkonti esperantistojn, aŭskulti prelegojn, partopreni interesajn programojn, ĝin organizas UEA kun surlokaj esperantistoj. La sekvontjara eĉ estos en ne tre fora lando, ni nepre partoprenu!

A: – Ĝi okazos fine de julio, kial jam nun okupiĝi pri ĝi?

H: – Jen, legu – se vi aliĝas ĝis la fino de la jaro, vi povos pagi malpli. Ne hezitu, ni veturos kune!

A: – Ŝajne bona ideo! Sed mi demandos Karlon, eble ankaŭ li volas veni, ja ankaŭ li parolas Esperanton.

A: – Halo, Karlo, ĉu estas vi? Aŭskultu, Herminjo jus montris al mi aliĝilon al UK... ah, vi ja scias.... bonege. Ĉu vere? Jes, ni faros tion ankaŭ en via nomo. Tre bone, jes, mi ĝojas!

A: – Ankaŭ Karlo deziras aliĝi al UK, kaj mi plenigu la aliĝilon ankaŭ por li.

II. La vojaĝo

Herminjo (H) babilas ĉe giĉeto de aŭtobusa stacidomo kun la Kasisto (K), poste kun Alinjo (A) jam en la aŭtobuso.

K: – Jes, ni havas ankoraŭ ĝuste du lokojn por la morgaŭa aŭtobuso. Ĉu vi deziras unudirektajn biletojn?

H: – Bonvolu doni du revenbiletojn, kun reveturo la 4an de aŭgusto. Ĉu la sidlokoj estas rezervitaj?

K: – Ne, oni povas sidiĝi laŭplaĉe sur liberajn seĝojn. Por la pakaĵoj vi pagos aparte, al la ŝoforo.

H: – Dankon. Kiam ni devas esti ĉe la stacidomo?

K: – Almenaŭ duonhoron antaŭ la ekveturo, la aŭtobuso ekveturos precize je la naŭa vespere, do, nepre antaŭ la oka kaj duono. Mi proponas